Universala Esperanto-Asocio

Internacia Ligo de Esperantistaj Instruistoj

# Landa parad'

## Kalejdoskopo de la regiona, landa kaj loka agado de nia mondvasta komunumo

Projekto lanĉita en 2018 sub la nomo GAMO.

# MONA

## Meza Oriento kaj Norda Afriko






Stefan MacGill, Budapeŝto, majo 2022

2020 oktobro.

2019: Versio 4: nov.  Versio 3: aŭgusto.

2018: Versio 2: junio, Versio 1: januaro

© Universala Esperanto-Asocio
© Internacia Ligo de Esperantistaj Instruistoj

# Landoj en Meza Oriento kaj Norda Afriko (MONA)

Tiu regiono havas dek landojn kun delegitoj aŭ iuspeca agado:

Alĝerio (DZ), Armenio (AM), Egiptio (EG), Irano (IR – prizorgata ankaŭ de la Azia Komisiono KAEM), Israelo (IL – same dividata kun Azio), Jordano (JO), Karvelio (GE), Maroko (MA), Tunizio (TN), Turkio (TR).

Pliaj eblaj landoj en MONA (nun sen delegitoj): Irako, Jordanio, Jemeno, Kataro, Libano, Libio, Palestino kaj Sirio. La landoj de la iama Sovet-unio tra la suda azio (Taĝikio, Uzbekio, Kazaĥio…). unuavice apartenas al Azio, sed MONA povus kunlabori. Same Irano kaj Israelo povas aparteni kaj al MONA kaj al Azio.

En la regiono, nur Israelo gastigis Universalan Kongreson (UK) aŭ junulara kongreso (IJK). Sed la Mezorientaj Kongresoj havas longan tradicion, kiuj regule altiras partoprenantojn el ekster la regiono:

2008 La 1a MK en Amano, Jordanio.
2009 La 2-a MK en Izniko, Turkio.
2010 La 3-a MK en Eskiŝehiro, Turkio.
2011 La 4-a MK en Irano. (nuligita pro lastmomentaj politikaj problemoj)
2012 La 5-a MK en Gaziantep, Turkio.
2013 La 6-a MK en Erevano, Armenio.
2014 La 7-a MK en Tbiliso, Kartvelio.
2015 La 8-a MK en Hamameto, Tunizio.
2016 La 9-a MK en Urgupo, Turkio. (24 partoprenantoj el 13 landoj)
2017 La 10-a MK en Kutaisi, Kartvelio kun postkongreso en Armenio.
2018 La 11-a MK en Marakeŝo, Maroko.
2019 La 12-a MK en Kashan, Irano
2012 La 13a MK okazus en Turkio en Cesme (apud Izmir), sed nuligita pro la pandemio.





Armena postkongreso post la 10a MK; 2017: Maroko kun Assane Faye, 2018; La 12a MK en Kaŝan, Irano.

De 2016 ĝis 2019 okazis ĉiujare AMO-seminario ene de MK. Fonto por la informoj:
https://eo.wikipedia.org/wiki/Mezorienta_Esperanto-Kunveno

Trovu informojn pri la Komisiono de UEA pri MONA fine de la nuna dokumento.

## Proponoj por aldoni al la laborplano por MONA

- Dediĉi atenton al Turkio – precipe la lerneja kaj universitata agado. Akiru kotizperanton, esplori kuraĝigon de la loka agado kaj fondo de landa asocio. Fondaĵo Canuto ĉefe celas en Turkio studentojn, persiulojn kaj senlaborulojn.
- Starigi ĉefdelegiton en Armenio, eĉ kotizperanto povus esti, same en Tunizio. En Armenio indas esplori pri ebloj fondi grupetojn ekster la ĉefurbo.

- Kuraĝigi al eŭropanoj aŭ aliaj pli kuraĝe postviruse viziti landojn kiaj estas Turkio, Armenio, kie ekzistas realaj lokaj grupoj, kiuj bonvenigus gastojn.
- La reta vizaĝo de MONA estas ekzemplodona – laboro de Vasil Kadifeli el Turkio kiu prezentas ne nur novaĵojn sed ankaŭ literaturaĵojn el la regiono, pere de *Wordpress*.
- Evoluigi plie retpaĝojn, kiuj povos prezenti baze la landojn de MONA sen propra retpaĝo – Alĝerio, Egiptio, Kartvelio, Tunizio kaj eble pliaj.
- Evoluigo de la nuna propono por laborplano por krei ion pli definitivan, kun i.a. renkontiĝoj, eldono de varbiloj kaj lerniloj, pliaj hejmpaĝoj (ekzemple en la araba aŭ aliaj regionaj lingvoj). La nova araba kurso tre bnvenas.

## Novigoj en <Landa Parad’> por 2022:

- ➔ Aktualigo de la popolaj datumoj, pri la jara kresko: novaj datumoj mankas.
- ➔ Aktualigo de la ciferoj por MEP (PAP), sed multaj reretas el 2020.
- ➔ Aktualigo de la membro-statistikoj pri la individuaj membroj de UEA por 2021.
- ➔ La tuta enhavo aperobita de la komisiono de MONA, en marto 2022.

## Novigoj en <Landa Parad’> por 2020:

- Aktualigo de la popolaj datumoj, aldono de datumoj pri la jara kresko kaj la grado de enurbiĝo.
- Transiro de MEP (nominala) al MEP laŭ po-persona aĉetpovo (angle: PPP).
- Ĝisdatigo de la individuaj membroj de UEA ĝis la 24a de oktobro.

================

# Alĝerio 

**Landkodo:** DZ**. Mono:** DZD (dinar)**. Telefonkodo:** 213**. Ĉefurbo:** Alĝero (Algiers). **Kat** 2.

**Areo:** 2.3 m km² (10a en la mondo). **Loĝantaro**: 44 milionoj (33a); 3,5 milionoj en la ĉefurbo.
**Denseco**: 18 homoj / km² . Jara kresko: 1.85%. Urbiĝo: 73%.
**Pokapa MEP (persona aĉetpovo - PAP):** $ 11,433 (138a en la mondo).
**Vikipedio:** E-paĝo ekzistas kaj ampleksas, sed MEP el 2006.

**Landa Asocio:** Ne estas, do ne aperas ĉe ‘Landoj’ en la retejo de UEA.
**LA-adreso, retadreso kaj hejmpaĝo: ne estas**

**Membraro IM en UEA.** 2021: 3. 2007: 4. FC 2021: 3. 2007: 4.
**Kotizperanto kaj sidejo:** Ne estas
**Komitatano de UEA:** Ne estas

**Delegitoj laŭ JL 2018:** 1 persono (1 D, 1 FD) en unu urbo: Guendouze
**Aliaj asocioj: --**
**Internaciaj aranĝoj:** Neniu konata.

2022: sendita mar 22. Ne venis respondo. La komisiono
2020: sendis aug 12. Al ĉiuj membroj, RC, RN. Sen reago.

# Armenio 

**Landkodo:** AM**. Mono:** AMD**. Telefono:** 374**. Ĉefurbo:** Erevano (Erevan aŭ Jerevan). **Kat**. 2

**Areo:** 30 m km² (138a en la mondo). **Loĝantaro**: 3.0 milionoj (137a); 1 miliono en la ĉefurbo.
**Denseco**: 104 homoj / km². Jara kresko: 0.19%. Meza aĝo: 35. Urbiĝo: 63%
**Pokapa MEP (PAP):** 13,638 (la 117a loko en la mondo).
**Vikipedio:** E-paĝo ekzistas, ampleksas, senkritika, kaj evitas efemerajn statistikojn.

**Landa Asocio:** AEU, 1991 (aliĝo al UEA 1997). Prez. Gayane Abrahamyan
Membroj de UEA fine de 2019: AM 25 + IM 9, sume 34.
**LA-adreso:** p/a Gayane Abrahamyan, Sari-tag str 19-A domo 5, AM-0017 Erevan, Armenio
**LA retadreso:** armesper<ĉe>yandex.com
**LA-hejmpaĝo:** https://aresun.weebly.com.

**Membraro en UEA.** 2021 10, **2018:14**, 2007: 10. FC 2021: 6. 2007: 10.
**Ĉefdelegito:** f-ino Meri Tiratsuyan, Erevan

**Kotizperanto:** Ne estas. Indus nomumi tiun.
**Komitatano de UEA:** Observanto: la prezidanto.
**Sidejo:** En Erevano. Ne estas oficejo.
**Klubo:** Troviĝas en Erevano.



**Delegitoj laŭ JL 2018:** 4 personoj (1 ĈD, 1 D, 2 FD) en 1 urbo: Erevano.
**Aliaj asocioj:** ILEI (sekcio) Lida Elbakjan <lidaelb<ĉe>yahoo.com>

**Internaciaj aranĝoj:** De 2004. ĝis 2011: Internacia Semajna Lernejo en Armenio, Internacia renkontiĝo "Armena Somero". La 6a Mezorienta Kunveno en 2013 en Erevano.
Postkongreso de la 10a Mezorienta Kunveno, 2017 en kaj ĉirkaŭ Erevano. Vidu la foton.

2022: iris mar 20
Permeso por adresaperigo petita julio 2019 en la kongreso de ILEI
2020: sendis aug 12, Respondo venis de MT.

# Egiptio



**Landkodo:** EG. **Mono:** EGP (pundo). **Telefonkodo:** 20. **Ĉefurbo:** Kairo (Cairo). **Kat.** 2

**Areo:** 1 m km² (29a en la mondo) **Loĝantaro**: 102 milionoj (14a); 20 milionoj en la ĉefurba areo.
**Denseco**: 103 homoj / km² · Jara kresko: 1.94%. Meza aĝo: 25. Urbiĝo: 43%.
**Pokapa MEP (PAP):** $13, 083, do en la 128a loko en la mondo.
**Vikipedio:** E-paĝo ekzistas, ampleksas, senkritika, plejparte aktuala.

**Landa Asocio:** Ne estas, **LA-adreso kaj retadreso:** --
**LA-hejmpaĝo:** http://esperanto-arab.jimdo.com

**Membraro en UEA.** 2021:3. 2007: 1 (dmj). FC 2021: 0. 2007: 0.
**Kotizperanto:**.--
**Komitatano de UEA kaj sidejo:** Ne estas.

**Delegitoj laŭ JL 2018:** 1 persono (1 D, 1 FD) en unu urbo: Kairo.
**Aliaj asocioj:** --
**Internaciaj aranĝoj:** Ne estis. Unu antaŭa membro de la MONA komisiono loĝas en Egiptio.

2022: iris mar 22. Senresponde.
2020: neniu enlanda retadreso havebla. Transsaltita

# Irano



***Prizorgata kunlabore kun la azia komisiono KAEM.***

**Landkodo:** IR. **Mono:** IRR (rial). **Telefonkodo:** 98. **Ĉefurbo:** Teherano (Tehran). **Kat.** 2

**Areo:** 1,65 m. $km^2$ (17a en la mondo). **Loĝantaro**: 84 milionoj (18a); 8,7 milionoj en la ĉefurbo.
**Denseco**: 52 homoj / $km^2$ · Jara kresko: 1.30%. Meza aĝo: 46. Enurbiĝo: 76%
**Pokapa MEP (PAP):** $ 17,832 do en la 78a loko en la mondo.
**Vikipedio:** E-paĝo ekzistas, ampleksas, senkritika, aktuala, evitas efemerajn statistikojn.




**Landa Asocio:** Irana Esperanto-Asocio (IREA) 1916, 1993 (aliĝo al UEA 2005)
Prez. Keyhan Sayadpour. Membroj: AM 100 + IM 32, sume 132. Bela kresko. Intetempe estas jam cent.
**LA-adreso:** N-ro 3, Saberi Bonbast, Shirvani aleo, Jomhouri strato, Tehrano IR 113584, Irano
**Telefono:** (021) 6671 8302
**LA retadreso:** info<ĉe>espero.ir
**LA-hejmpaĝo:** <espero.ir>
bona retejo en la persa kaj Esperanto
**Organo:** Irana Esperantisto (4 n-roj), red. adreso: p/a IREA

**Membraro en UEA.** 2021: 32. **2018: 43.** 2007: 45. FC 2021: 22. 2007: 31.
**Ĉefdelegito:**. A.R. Mamduhi.
**Kotizperanto:**.Ĉe IREA.
**Komitatano de UEA:**:Kom. A por IREA: d-ro K. Sayadpour.
Komitatano A por ILEI: . Mamduhi
**Sidejo:** Adreso en Teherano. Estas oficejo (adreso supre – kaj sur la revua kovrilo).
**Lokaj grupoj:** Ne venis informoj.




**Delegitoj laŭ JL 2018:** 20 personoj (1 ĈD, 10 D, 0 VD, 9 FD) en 9 urboj.
**Aliaj asocioj:** TEJO (IREJO), (sekcio): ILEI: Ahmad R. Mamduhi <mamduhi<ĉe>gmail.com>
**Aranĝoj:** Okazis ses naciaj kongresoj. La sesa okazis en aprilo 2020 (ĉefe virtuale). Okazis en Irano AMO 54 en Kaŝano kadre de la nacia kongreso, poste la virtualaj seminarioj 63 V, 64 V kaj 65 V okazis pere de Irano (majo-julio), kies teknika prizorgo estis ekzemplodona.

**Delegitoj:** 18 (1 ĈD,7 D, 16 FD) en 8 urboj.
**Aliaj asocioj:**
TEJO (IREJO), s-ro Ranjpour <a.ranjpour<ĉe>yahoo.com.
ILEI (sekcio) A. R. Mamduhi <mamduhi<ĉe>gmail.com



**Internaciaj aranĝoj:** Okazis kvin naciaj kongresoj. La kvina okazis en aprilo 2018. La 12a Mezorienta kongreso (MK) okazis en mar 2019, kun AMO 54 ene. Poste la virtualaj seminarioj 63 V, 64 V kaj 65 V okazis pere de Irano (majo-julio), kies teknika prizorgo estis ekzemplodona.

2022:dividata kun Azio: 2020: aug 11, MD, KS

# Israelo 

***Prizorgata kunlabore kun la azia komisiono KAEM.***

**Landkodo:** IL**. Mono:** ILS (ŝekelo)**. Telefonkodo:** 972**. Kat 5.** FC intervenas.

**Areo:** 221 mil km² (150a en la mondo) **Loĝantaro**: 8.8 milionoj (97a); 930 mil en Jerusalemo.
**Denseco**:400 homoj / km². Jara kresko: 1.60%. Meza aĝo: 30. Enurbiĝo: 93%.
**Pokapa MEP (PAP):** $ 42,570 do en la 46a loko en la mondo.
**Vikipedio:** E-paĝo ekzistas, ampleksas, senkritika, kaj evitas efemerajn statistikojn.

**Landa Asocio:** ELI, 1949 (aliĝo al UEA 1961). Prez. Prof. Amri Wandel. Membroj de UEA fine de 2021: AM89, IM 55, sume 144.



**LA-adreso:** P.O.K. 21132, IL-6121101 Tel-Aviv.
**LA retadreso:** eli<ĉe>esperanto.org.il

**LA-hejmpaĝo:** [http://www.esperanto.org.il](http://www.esperanto.org.il) en Esperanto kaj la hebrea.

**Organo:** Israela Esperantisto (2 n-roj), red.: A. Wandel

**Membraro en UEA.** 2021: 55. 2007: 58. FC 2021: 7, 2007: 0.
**Ĉefdelegito:** Jehosua Tilleman en Kirjat-Mochin.
**Kotizperanto:** La ĈD.
**Komitatano de UEA:** Amri Wandel (A) ankaŭ estrarano de UEA pri Faka Agado.
**Sidejo:** Nova oficejo/kunvenejo en la konstruaĵo bildigita. 10-minuta promeno de la trajna haltejo Ha Shalom.

**Delegitoj:** 28 personoj (1 ĈD, 10 D, 2 VD, 22 FD) en 18 urboj
**Aliaj asocioj:** TEJO (JELI), ILEI (reprezentanto): Luiza Carol, <luizacarol1947<ĉe>gmail.com.
**Internaciaj aranĝoj:** 85a UK en Tel Aviv en 2000. La 33a IIK en Hadassim en 2000. La 42a IIK en 1996 en Neurim, La 69a IJK en 2013 en Nazareto. La 7a Azia Kongreso en 2013 en Jerusalemo. La landa kongreso: 2-5 aprilo 2020 en Tel Aviv kun internacia partopreno. Okazis en aprilo 2022 la unua AMO-seminario en Israelo, AMO 85 pri scienco, kadre de la Israela Kongreso 2022.

2022: aktualigita kune kun la Azia LAPA.
2020: Traktita sub Azio. Kaj unuecigita okt 25.

# Jordanio 




**Landkodo:** JO**. Mono:** JOD (dinar)**. Telefonkodo:** 962**.**
**Ĉefurbo:** Amano (Amman). **Kat.**: 2

**Areo:** 89 mil km² (110a en la mondo) **Loĝantaro**: 10,2 milionoj (88a); 4 milionoj en la ĉefurbo.
**Denseco**: 115 homoj / km² · Jara kresko: 1.00%. Meza aĝo: 24. Urbiĝo: 91%.
**Pokapa MEP (PAP):** $ 10, 590 do en la 143a loko
**Vikipedio:** E-paĝo ekzistas, sed malampleksas, kaj havas iom da ege eksdataj datumoj.

**Landa Asocio:** Ne estas.
**LA-adreso: kaj retadreso:--**
**LA-hejmpaĝo:** http://esperanto-arab.jimdo.com

**Membraro IM en UEA.** 0
**Kotizperanto :**. --
**Aliaj asocioj:** Nenio konata.
**Aranĝoj:** La Unua Mezorienta Kongreso okazis en 2008 en Amano. Okazis en 2019 kunsido en Aquaba, kunlabore kun la Israela Kongreso.

2022: iris mar 22.
2020: Neniu membro de UEA post 2011. Transsaltita.

# Kartvelio 



**Landkodo:** GE**. Mono:** GEL (lari)**. Tel.:** 995**.**
**Ĉefurbo:** Tblisio (Tblisi). **Kat**.: 2

**Areo:** 70 mil $km^2$ (119a en la mondo)
**Loĝantaro**: 4,0 milionoj (132a); 1.1 milionoj en la ĉefurbo.
**Denseco**: 57 homoj / $km^2$ Jara ŝanĝo: minus 0.19. Meza aĝo: 38. Urbiĝo: 58%
**Pokapa MEP (PAP):** $15,709; 110a loko.
**Vikipedio:** E-paĝo ekzistas kaj ampleksas.

**Landa Asocio:** KEA, 1990 (aliĝo al UEA 1999). Prez. Nana Ĥizambareli. Membroj: AM 20 + IM 1. Sume 21 (2020: 28).
**LA-adreso:** N.Ĥizambareli, Pos. TEMKA, X, kvart., 32 korp., loĝ. 51, GE-0178 Tbilisi.
**LA retadreso:** karesa<ĉe>mail.ru



**LA-hejmpaĝo:** Ne aperas.

**Membraro en UEA.** 2021: 1. 2007: 2. FC 2021 0. 2007: 1.
**Komitatano de UEA:** Rajtus nomumi observanton sed ne faris tion.
**Delegitoj laŭ JL 2018:** 1 personoj (1 D) en 1 urbo: Kutaisi.
**Aliaj asocioj:** --
**Internaciaj aranĝoj:** La 7a Mezorienta Kunveno en 2014 en Tblisi. La 10a Mezorienta Kunveno en marto 2017 en Kutaisi kune kun la 31a AMO-seminario (vidu la fotojn).

2022: iris mar 22. Sen reago.
2020: aug 12, NH, nova junulo. Sen reago. Unu adreso NH resaltis.

# Maroko 




**Landkodo:** MA**. Mono:** MAD (dirham)**. Telefonkodo:** 212**.**
**Ĉefurbo:** Rabato (Rabat). **Kat**. 2.

**Areo:** Eble 711 mil $km^2$ (40a en la mondo) **Loĝantaro**: 37,0 m; 3.7 milionoj en Kasablanko.
**Denseco**: 83 homoj / $km^2$, Jara kresko: 1.20%, Meza aĝo: 30. Urbiĝo: 64%
**Pokapa MEP:** $ 8,027 do en la 153a loko en la mondo.
**Vikipedio:** E-paĝo ekzistas, ampleksas, senkritika, kaj evitas efemerajn statistikojn.

**Landa Asocio:** Ne estas.

**LA-hejmpaĝo:** Provu ĉe: http://esperanto-arab.jimdo.com



**Membraro en UEA.** 2021: 5. 2007: 2.  FC 2021: 4 2007: 2.

**Sidejo:** Ne estas.

**Aliaj asocioj: --**
**Internaciaj aranĝoj:** La 11a Mezorienta Kunveno en Marakeŝo en aprilo 2018 (vidu la foton.). Legu la programon ĉe:
http://uea.org/vikio/Prelegoj_en_Marakeŝo.

Foto: SMG

2022:  iris mar 22. Senreage.
2020: aug 12. Sendita al 4 adresoj, unu resaltis. Sen reago.

# Tunizio 

**Landkodo:** TN. **Mono:** TND (dinar). **Telefonkodo:** 216. **Ĉefurbo:** Tunizo (Tunis). **Kat** 2.

**Areo:** 163 mil km² (91a en la mondo). **Loĝantaro**:12 milionoj (79a); 2 miliono en la ĉefurbo.
**Denseco**: 76 homoj / km². 70% en urboj. Jara kresko: 1.06%. Meza aĝo: 33.
**Pokapa MEP (PAP):** $10,594 do en la 141a loko en la mondo (sama kiel 2020).
**Vikipedio:** E-paĝo, iom neaktuala.



**Landa Asocio:** Ne estas.  **LA-hejmpaĝo:** -- Provu ĉe http://esperanto-arab.jimdo.com

**Membraro en UEA.** 2021: 1 2007: 4.  FC 2021: 1 (2020: 3). 2007: 2.
**Komitatano de UEA: --**
**Sidejo:** Ne estas.

**Delegitoj laŭ JL 2018:** 2 personoj (2D, 1 FD).
**Aliaj asocioj: --**
**Internaciaj aranĝoj:** La 8a Mezorienta Kunveno en Hammamet en 2015 (bildo).

2022:  iris mar 22. Senreage.
Sendita aug 12 al tri adresoj. Unu resaltis. Sen reago.

# Turkio 

**Landkodo:** TR. **Mono:** TRY (lira). **Telefonkodo:** 90. **Ĉefurbo:** Ankaro (Ankara). **Kat**. 3

**Areo:** 783 m km² (36a en la mondo). **Loĝantaro**: 84,3 milionoj (17a); 15 milionoj en Istanbul.



Foto: Turkoj en Tunizio SMG

**Denseco**: 110 homoj / km² (107a en la mondo), Jara kresko: 1.09%. Meza aĝo:: 32. Urbiĝo: 76%.

**Pokapa MEP (PAP):** $ 322, 278, 68a loko en la mondo. (senŝanĝa el 2020)
**Vikipedio:** E-paĝo ampleksas: https://eo.wikipedia.org/wiki/Turkio.

**Landa Asocio:** Ne estas. Fondinda.
**LA-adreso kaj ret-adreso:** https://www.facebook.com/groups/esperanto.turkiye
**LA-hejmpaĝo:** https://esperantoturkiye.wordpress.com/ kun kulturaj paĝoj ene. Bonega ligilo por la lando kaj la regiono.

**Membraro en UEA.** 2021: 15. 2007: 4. FC 2021: 6 (2020: 9). 2007: 1.
**Kotizperanto:**.Ne estas, nomuminda. **Komitatano de UEA: --. Sidejo:** Ne estas.



**Delegitoj laŭ JL 2018:** 2 (1D, 2 FD) en du urboj: Alanya, Istanbulo. Indus esti pli – turkaj junuloj!
**Aliaj asocioj:** TEJO aktivis. ILEI (kontaktpersono) Vasil Kadifell <vasilkadifeli<ĉe>gmail.com>
**Internaciaj aranĝoj:** La Dua Mezorienta Kunveno okazis en 2009 en Izniko. La Tria Mezorienta Kunveno okazis en 2010 en Eskiŝehiro. La 5a Mezorienta Kunveno okazis en 2012 en Gaziantep. La 9a Mezorienta Kunveno en Ürgüp en 2016 (vidu la foton.). La 13a Mezorienta Kunveno en Turkio planita por 2020 fine de marto el Cesme (apud Izmir) sed nuligita pro la pandemio.

2022: iris mar 22. Senreage.
2020: sendita aug 12.Reagis kaj donis novajn informojn..

# 10 landoj prezentitaj

La komisiono de UEA pri MONA por la periodo 2019-2022 konsistas el:

Keyhan Sayadpour <ksayadpour@gmail.com> (gvidanto),
Annie Grente <anniegrente@hotmail.fr> (Mezorientaj Kunvenoj),
Wael Almahdi <wael.almahdi@gmail.com>,
Park Chung Kil <kwtpark@hotmail.com>,
Vasil Kadifeli <vasilkadifeli@gmail.com>,
Murat Özdizdar <mozdizdar@uaa.k12.tr>,
Stefan MacGill <stefan.macgill@gmail.com>,
Hamzeh Shafiee <hamzeho@gmail.com>,
Amri Wandel <amriwandel@gmail.com>,

Eblas aldoni homojn, sub konstruo estas listo de landaj reprezentantoj, kiuj povos apogi tiun komisionon. Ĝis julio 2019 la situacio estis:

Renato Corsetti IT/GB, kunordiganto, Annie Grente MA, Ahmed Belmiloud DZ, Latif al Sharif SY/SE, Taled Orabi SY, Ahmead Lateef EG, Murat Ozdizdar, TR, Vasil Kadifeli TR, Park Chung Kil KW, Dorota Parzyszek, TN, Ahmed Mansur, MA, Nana Ĥizambareli GE, Gayane Abrahamyan (AM) kaj la respondeca estrarano ĉe UEA estis Stefan MacGill (HU/NZ).

Laborplano de MONA: http://uea.org/vikio/Labor-Programo_De_La_Komisiono_MONA

### Pliaj informoj:

Kiel ĝeneralan paĝon por ĉiuj landoj sen propra paĝo povas funkcii: https://monainformado.wordpress.com/contact/.

https://monainformado.wordpress.com/ estas la ĝenerala paĝo por ĉiuj landoj, kiu laŭgrade povas krei paĝojn por unuopaj landoj, kiam estas io por registri. Arabe kaj esperante:

## Fontoj por 2022

### Popolaj datumoj

https://www.worldometers.info/world-population/population-by-country/
Prilaboro de datumoj de Uniĝintaj Nacioj, (Department of Economic and Social Affairs, Population Division. World Population Prospects: The 2019 Revision. Plej novaj datumoj uzitaj, persiste kaj daŭre nur 2020. Ĉefurbaj popoloj, laŭ unuopaj esploroj. Kiam eble, temas nur pri la vera ĉefurba zono, foje temas pri la pli granda metropola areo.

### Publika bonfarto

https://en.wikipedia.org/wiki/List_of_countries_by_GDP_(PPP)_per_capita. Persona aĉetpovo (PAP). Datumoj ĝis aprilo 2021 laŭ ciferoj de la Internacia Monuma Fonduso (IMF) en USD. Konstateble granda falo en prospero tra la regiono, pro la falo de kursoj inter la lokaj valutoj kaj dolaroj.




Unu komunikilo de MONA.

2022: ekpretigo mar 2021.  Mar 21, iris al RC AG, VK. RC aprobis.
2020: versio 1 preta augusto 23; .2020: IM membraro aktualigita okt 24.
2019: versio 1:  iris al la Komisiono.
2019 versio 2: por la Komitato. Versio 4 nov 2019 por <aktivulo.net>

Al: RC VK, AG, MO dec 2